*********************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2017/02 (novembro 2017)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*********************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

kiel kutime, mi provas raporti pri nia asocio, informi vin pri kelkaj pasintaj eventoj rilate al Esperanto-instruado kaj aperigi anoncojn pri estontaj okazaĵoj, interesaĵoj.

## 1. Nia asocio

La jarĉefkunveno de AGEI bonorde okazis en junio 2017 dum GEK en Freiburg. Ĝin aktive partoprenis krom multaj membroj ankaŭ vizitantoj, interesiĝantoj. Parttempe ĉeestis kaj salutis la kunvenon ankaŭ la prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean. La prezentitan jarraporton kaj financan raporton oni povas trovi sur la AGEI-paĝaro http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

Jam nun mi invitas ĉiujn al la sekva jarĉefkunveno enkadre de la 95a Germana Esperanto-Kongreso okazonta en Zweibrücken inter 18-21 majo 2018.

## 2. Membrokotizo 2018

Nia membraro iom malkreskis pro bedaŭrinda forpaso de kelkaj maljunaj membroj. Ni tamen esperas, ke aperados novaj membroj kaj mi alvokas ĉiujn por informi pri AGEI, proponi membrecon, varbi por abono de la gazetoj IPR kaj Juna amiko kaj utiligi la membrecon por rabatoj ekz. ĉe partopreno en landaj kaj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj. Aliĝilon, sciindaĵojn, detalojn pri membreco vi trovas ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=78065795

La membrokotizo ne ŝanĝiĝos en 2018 kaj ni dankas al ĉiuj fidelaj membroj pro la daŭra pago de la membrokotizo, kio ja estas bona subteno por la funkciado de nia asocio.

## 3. Gazetoj IPR kaj JA: NOVA MEMBROKATEGORIO

La AGEI-jarkotizo (25 EUR) enhavas la abonon de IPR. Novaĵo estas, ke ekde 2018 ILEI ofertos kombinitan aboneblon kun la revuo Juna Amiko (JA). Skipo laboras por krei belaspektan enhavoriĉan revuon, kiun la abonantoj legas eksciante multon kaj amuzante sin en enigmoj kaj ludoj. La revuo estas plenkolora kaj aperas kvarfoje jare por progresantaj legemuloj inter 10 kaj 100-jaraĝaj. ILEI kreis novan membrokategorion: **supera membro**, kiu enhavas rabaton en la abono de Juna Amiko. Ni certas, ke ĉiuj legantoj de Juna Amiko lertiĝas kaj feliĉas vidante la belaspektajn paĝojn kaj legante la interesajn rakontojn, raportojn, kvizojn kaj bildstriojn. Ni esperas, ke multaj ILEI-membroj uzos tiun novan eblon.

La abono al Juna Amiko estas 18 EUR, do kun la AGEI-kotizo entute 25+18=43, sed ekde 01.01.2018 la komuna sendo de papera IPR kaj papera JA en la sama koverto **kostos nur 37 EUR**.

**Bv. elekti membrokategorion. Ekde 2018 mi ŝatus esti:**

☐ regula membro (kun IPR 25 €)

☐ supera membro (kun IPR+JA 37 €)

Bv. informi min **ĝis 31.12.2017** pri via elektita kategorio en letero aŭ per retmesaĝo: zsofia.korody@esperanto.de

## 4. Lerneja instruado

Bedaŭrinde nek ĉi-jare mi povas raporti pri multaj lernejaj klasoj, pri multloka oficiala instruado de Esperanto. En Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo mi daŭre ofertas Esperanto-lecionojn en la EMA Gimnazio kaj en la bazlernejo Nicolai: 1 foje semajne 60 minutoj

Gratulinda iniciato venis de Ralf Haumer el Zwickau: en lernejkomenca festo de la gimnazio li starigis informtablon kun taŭgaj varbmaterialoj, ludoj por atentigi pri Esperanto. Li petis kaj el la metodika biblioteko de la Esperanto-Centro Herzberg mi sendis al li kelkajn instruhelpilojn. Multaj homoj venis al la tablo, li prezentis la lingvon al la gejunuloj kaj renkontis plenkreskulojn, kiuj jam aŭdis pri Esperanto kaj eĉ havas malnovan libron en aŭ pri ĝi. Eĉ se poste ne ekestis lernrondo, almenaŭ multaj aŭdis pri la internacia lingvo dum tiu prezentado.

**Lernejajn (kaj ankaŭ aliajn) kursojn bv. anonci ĉe edukado.net!**

## 5. Esperanto-kursoj, lernado

### 5.1. Duolingo

En septembro venis la novaĵo: miliono da homoj lernas Esperanton nun per la populara interreta lernprogramo Duolingo el la angla! Estas ankaŭ ĝojige, ke pli kaj pli ofte oni povas aŭdi, ke tiuj retlernantoj poste serĉadas kontakton kun aliaj parolantoj, serĉas pluajn stud- kaj ekzercadeblojn, do ili aperas en ĉeestaj kursoj, en klubkunvenoj kaj en diversaj Esperanto-aranĝoj. Kelkaj petas parolad-eblon, al ili ni povas rekomendi Ekparolu! - la oferton de edukado.net, aŭ per personaj skype-paroladoj ni povas helpi ilin ekuzi la lingvon por konversaciado pri ĉiutagaĵoj aŭ specifaj temoj laŭ interesterenoj.

### 5.2. Radio-kurso de Thomas Bormann

Esperanto-kursetoj estis sekveblaj en la elsendo "Schmidts Samstag" en SWR 1 Baden-Württemberg. La lernmaterialo estis bone strukturita, enhavis bazajn parolturnojn, klarigojn pri gramatiko, vortuzado, frazstrukturo, ktp. Thomas Bormann agrable, trankvile informis pri la lingvo kaj donis memoreblajn ekzemplojn. La kvin kelkminutaj video-prezentadoj estas troveblaj per ligiloj ĉe Kursoj, lernhelpiloj de nia AGEI-paĝaro http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=54861342 aŭ per la SWR-paĝaro https://www.swr.de/swr1/bw/programm/working-for-the-weekend-schmidts-samstag/-/id=446250/did=15005332/nid=446250/tj7ql1/index.html

### 5.3. Esperanto in Kassel

Volonte ni plusendas ilian raporton: Die Esperantosprecher Kassels haben sich organisiert als Esperanto-Rondo Kassel im Rahmen der Kulturinitiative Harleshausen e.V. (KIH, www.kih-kassel.de).
Sie treffen sich jeden Donnerstag ab 19:00 im Raum der KIH, Karlshaferner Str. 2 (am Ossenplatz), 34128 Kassel. Auf diesen regelmässigen Treffen wird nicht nur die neutrale internationale Sprache Esperanto, die inzwischen über 125 Jahre alt ist, unterrichtet und gesprochen, sondern es gibt auch ein regelmässiges Kulturprogramm. Dieses Programm fühlt sich besonders den Themen Frieden, Menschenrechte und Nachhaltigkeit im Rahmen der Verständigung von Menschen mit unterschiedlicher Herkunft und unterschiedlichen kulturellen Wertemustern verbunden. In sieben der neun Partnerstädte Kassels gibt es zur Zeit Esperantogruppen.

### 5.4. Popolaltlernejaj k.a. kursoj

Eĉ se ne ĉiam aliĝas sufiĉas kursanoj al tiuj kursoj, tamen indas aperigi kursofertojn per la regionaj VHS-kanaloj. Kelkfoje eĉ malmultnombraj grupetoj eklernas Esperanton. Gratulojn al Daniela Hölzle (Bad Wörishofen) kaj Helga Plötner resp. Heide Pohl (Lutherstadt Wittenberg) pro la iniciatemo, sukcesa lanĉo kaj instruado de tiuj grupetoj.
En Herzberg, malgraŭ tio, ke mankis sufiĉaj aliĝintoj al popolaltlerneja oferto, tamen venis pluraj interesiĝantoj al la Esperanto-Centro por eklerni Esperanton per semajnfina intensa kurso meze de novembro.

### 5.5. KEKSO

**P**aralele kun Torpedo-12 fine de septembro-komence de oktobro 2017 okazis en la Esperanto-Centro Herzberg KEKSO, aktiviga, intensa lingvokurso de Germana Esperanto-Junularo sub gvido de Michaela Stegmaier, GEJ-prezidantino. Specialaĵo de tiu kurso estas la tuttaga kunestado de gejunuloj kaj vere aktiva uzo de la lernata lingvo por tuja komunikado en realaj vivsituacioj. Tiel Esperanto ne estas iu seka lernobjekto, sed fariĝas rekte uzebla, bezonata helpilo por interkompreniĝo de samaĝuloj.

### 5.6. SEP-2: Somera Esperanto-Perfektigo en Herzberg

La duan fojon ni organizis someran intensan Esperanto-kursaron (SEP) en la Esperanto-Centro Herzberg. La evento estis dusemajna kaj internacia (el BG, CH, CU, HU, NL, PL), kelkaj kursanoj restis dum la tuta periodo, aliaj elektis unusemajnan blokon. En ambaŭ partoj la lingvoinstruado okazis en du grupoj: por la komencintoj (A1-B1) kaj por la perfektiĝemuloj (B2-C1). Post kvin instruhoroj ofte ni manĝis kune kaj organizis posttegmazajn ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo kun urborigardado, vizitis muzeojn, banejojn, migradis en la arbaro, testadis promenvojojn en la Harz-montaro.
La programon riĉigis kulturaj kaj muzikaj eventoj, komuna kuirado, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. La partoprenintoj havis la eblon renkontiĝi, paroladi kun lokaj klubanoj, vizitantoj kaj aliaj Esperanto-parolantaj gastoj. Je la fino de la semajno ĉiuj ricevis atestilon pri partopreno. La tuttaga lingvouzo vere helpis ĉiujn perfektigi siajn lingvajn kapablojn kaj la tre amika, agrabla etoso certigis bonfarton. La regiona gazeto raportis pri juna prelegantino el Kubo, kiu prezentis sian landon en la urba biblioteko. Pro la sukceso ni planas novan 2-semajnan lernadon en somero 2018. (Fotoalbumo 1 kaj 2)

### 5.7. Lernejaj kursoj

Bedaŭrinde mi ne ricevis raporton pri Esperanto-instruado en lernejoj, do mi povas raporti nur pri la kursoj en Herzberg.

En aŭgusto 2017 komenciĝis Esperanto-fakrondo en Nicolai-bazlernejo en Herzberg. Enkadre de la Tuttaga Lerneja programo ĝi estas inter la posttagmeze elekteblaj fakoj. La lecionoj por la 6-9 jaraj infanoj daŭras 60 minutojn sub gvido de Zsófia Kóródy.

En aŭgusto komenciĝis Esperanto-fakrondo ankaŭ en EMAG-gimnazio en Herzberg enkadre de la posttagmezaj libere elekteblaj lecionoj. La lecionojn, gvidatajn de Zsófia Kóródy partoprenas lernantoj el la 5a kaj 6a klasoj. Ambaŭ kursoj estas oficiale registritaj ĉe la federaci-landaj edukinstancoj.

## 6. Biblioteko

Ni ĝojas sciigi vin, ke la kompletaj tekstoj de la skanitaj periodaĵoj – pli ol 70 diversaj titoloj kun entute pli ol 900 jarkolektoj – estas sisteme traserĉeblaj laŭ unuopaj nocioj. La traserĉo eblas pere de la retejo ANNO (AustriaN Newspapers Online): http://anno.onb.ac.at/anno-suche#searchMode=complex&from=1

## 7. Eŭropaj projektoj: Erasmus+

### 7.1. Kroatio

„Ĉu vere studoj de Esperanto faciligas lernadon de aliaj lingvoj? Tion esploros nova projekto kun la nomo "Lingva Akcelilo", kiun financas Eŭropa Unio."

La kroata nacia agentejo de la EU-fondaĵo Erasmus+ decidis subteni per proksimume 250.000 eŭroj la projekton Lingva Akcelilo, en kiu kunlaboros naŭ partneroj el Slovenio, Slovakio, Kroatio, Bulgario, Germanio kaj Danio. Inter la partneroj estas du universitatoj kaj kvar lernejoj.

Laŭ informoj de Zlatko Tišljar, unu el la ĉefaj motoroj de la iniciato, la projekto estos realigata ekde novembro 2017 kaj daŭros ĝis decembro 2019. Ĝia ĉefa partnero estas la kroatia eldonejo Izvori, kiu jam eldonis kelkdek Esperanto-librojn. Partoprenos ankaŭ Inter-kulturo en Slovenio kun sia sperto pri la Zagreba metodo instrui Esperanton kaj la organizaĵo E@I.

–Temas pri projekto kiu kreos instrurimedojn (didaktikaĵojn) por instruistoj kiuj gvidos en lernejoj kurson Lingva Akcelilo, kiu poste esence plirapidigos la lernadon de dua aŭ tria fremdlingvo. La projekto antaŭvidas kurson por infanoj 7-8-jaraj kiuj scias skribi kaj legi, sed nenion pri lingvaj reguloj kaj gramatiko.

Gravaj partneroj kompreneble estas la du universitatoj – Universitato de Maribor en Slovenio kaj Suddana universitato en Odense. La kvar partoprenontaj elementaj lernejoj troviĝas en Slovenio, Kroatio, Slovakio kaj Bulgario. Inter la partneroj estas ankaŭ Studio Gaus el Berlino, kiu okupiĝos pri retaj solvoj.

**La celo de la projekto** estas ellabori instrumetodon, kiu tra tre baza Esperanto helpos infanojn ekhavi komprenon pri la elementaj strukturoj de lingvoj. Samtempe la infanoj efektive ekparolu kaj ekuzu Esperanton sur minimuma nivelo, por povi komuniki kun lernantoj en aliaj landoj.

La metodo uzos nur 250 radikojn, kiuj laŭ Zlatko Tišljar sufiĉas por kompreni 90 procentojn el ordinaraj tekstoj. Tian minimuman Esperanton laŭplane lernos infanoj en la 2-a aŭ 3-a klaso de elementa lernejo.

Por la instruado oni laŭplane uzos la unuajn ses lecionojn en jam ekzistanta retejo, kiu sekvas la Zagreban metodon. La unua eksperimento okazos en kvar elementaj lernejoj, kie grupo da infanoj dum du monatoj trairos la unuajn du lecionojn.

### 7.2. Germanio-Pollando-Slovakio

Fine de septembro en Herzberg okazis la dua trejnsesio de la dujara Erasmus+ projekto de pola, slovaka kaj germana partneroj. La celo de la projekto kun la titolo: 'Tripieda ponto' estas trejni instrukapablajn fakulojn kaj movadajn gvidantojn. Hotelo Zum Pass estis ideala loko por la dudeko de partoprenantoj por tranokti, manĝi kaj lernadi sub la sama tegmento. La projektgvidantoj: Halina Komar, Peter Balaz, Dorota Rodzianko, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy kunsidis por verki raporton pri la ĝisnunaj agadoj kaj plani la sekvan jaron, Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge prizorgis la Esperanto-instruadon kaj la aldonajn distrajn programerojn por la trejnitoj. Ĉiuj ĝuis la semajnan kunestadon, post lacigaj studhoroj la promenadojn en la bela ĉirkaŭaĵo, la amuzajn vesperojn, festadon. Restis tempo ankaŭ por ĉirkaŭrigardi en la Esperanto-urbo, viziti la bibliotekon de la Esperanto-Centro, renkonti membrojn de la loka Esperanto-klubo. Ili povis ĉeesti la fakprelegon de Sabine Fiedler enkadre de la paralele okazantaj Pedagogiaj Tagoj (Torpedo-12), renkontiĝis ankaŭ kun instruistinoj el la pola ĝemelurbo Góra kaj kun la kursanoj de la GEJ-lingvokurso sub gvido de Michaela Stegmaier. Tiel ili povis akiri kroman fakan klerigadon kaj movadan spertiĝon.

**7.3. TORPEDO-12**
La Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (samtempe 79a studsesio) okazis inter septembro 29 - oktobro 3 2017, organizite de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj AGEI, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. La kvintaga seminario havis la sekvajn ĉeftemojn:
1. Tago de observado: raportoj pri instrusperto kaj instrurilataj movadaj eventoj; 2. Tago de prelegoj; 3. Tago de metodiko; 4. Tago de informado, organizado; 5. Tago de biblioteko. La ĉi-jara ĉefpreleganto estis Sabine Fiedler, kies interesa prezentado pri frazeologio allogis 30 partoprenantojn, inter ili la trejnistojn kaj trejnitojn de la internacia Erasmus+ projekto el Nederlando, Pollando kaj Slovakio. Zsófia Kóródy traktis tradiciajn (ekz. Cseh-metodan) kaj modernajn instrumetodojn, prezentis lernolibrojn kaj lingvajn ludojn ankaŭ al la partoprenantoj de KEKSO, lingvokurso por GEJ-junularo, kiu paralele okazis sub la gvido de Michaela Stegmaier. Peter Zilvar gvidis laborrondon pri informado, varbado kaj gazetara laboro, Martin Ptasinski elektis prelegtemon pri instruado de Esperanto al germanlingvanoj.
La semajnfinan seminarion partoprenis ankaŭ koleginoj el la pola ĝemelurbo Góra, kiuj ankaŭ kunsidis kun ICH-kunlaborantoj por analizi kaj plani junularajn interŝanĝprogramojn.

## 8. Instruhelpiloj, retaj ofertoj

**8.1. Esperanto en dialogo**
*Esperanto en dialogo* estas la titolo de la kompleksa **interreta kurso de Dr. Rudolf Fischer**. Ĝi estas por germanlingvanoj, kiuj trovas tie en 10 lecionoj ĉiujn materialojn, klarigojn, ekzercojn, vortaron, ktp. Ne nur aldoniĝis tre detalaj instruoj pri gramatiko, sed bonege helpas la lernadon miloj da ligiloj al vortklarigoj. La kurso enhavas abundan ekzercaron (kun solvo) kun klaraj ekzemploj, vortoj, frazoj, utilaj esprimoj el kaj por la ĉiutaga vivo. Kromaj lernhelpiloj estas kelkaj ilustraĵoj kaj mp3 sonmaterialoj.
**Jen, kiel prezentas sian kurson la aŭtoro:**
*Nahezu 15 Jahre lang hat es gedauert, bis dieses Lehrwerk Esperanto en dialogo nach vielem Entwerfen, Ausprobieren in Kursen und Umarbeiten die vorliegende Form gefunden hat.... Ich wollte meine Erfahrung aus über 40 Jahren Lehrtätigkeit in Esperanto-Kursen in einem entsprechenden Werk zusammenfassen.... Inzwischen liegen auch Prüfungserfahrungen nach den Richtlinien des Europäischen Referenzrahmens auf der Basis dieses Lehrwerks vor. Danach sollten die ersten beiden Lektionen für das Niveau A1 genügen; die Lektionen 1-4, sicher aber 1-5, um die Stufe A2 zu erreichen. Eine Testgruppe von Studenten der Allgemeinen Sprachwissenschaft ist in 1 Semester (5 Monate, 12 Doppelstunden) bis Lektion 4 gekommen. Die abschließende Klausur und eine dreiteilige mündliche Prüfung waren einsprachig. Das ist ein sensationell schneller Lernerfolg im Vergleich zu anderen Fremdsprachen.*
Ni gratulas al s-ro Fischer kaj elkore dankas pro la libera aliro de tiu valora kursmaterialo. Jen la trovejo:
http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/index.html

**Esperanto en dialogo hat die Form eines Supertextes (Hypertext) mit vernetzten Bestandteilen:**

- die Lektionen mit ihren Lehrtexten
- die Übersetzungen und Lösungen zu jeder Lektion,
- einen Hinweisteil zur Aussprache, Betonung und Rechtschreibung,
- sporadisch dazu mp3-Tonwiedergabe(dateien),
- die Grammatikerläuterungen zu jeder Lektion,
- das nach Wortstämmen alphabetisch geordnete Wörterbuch Esperanto-Deutsch, mit vielen Wortformen und Ableitungen zu jedem Wortstamm, sowie mit Beispielsätzen für ihre Verwendung,
- eine Wörterliste Deutsch-Esperanto, die nur zum Nachschlagen einer Esperanto-Vokabel dient, aber auch anzeigt, wo diese zuerst vorkam.

**8.2. Lingolia**
La retpaĝaro Lingolia.com ofte aldonas novaĵojn por lernemuloj, do instruistoj povas trovi utilajn materialojn por siaj lecionoj kaj rekomendi al siaj lernantoj serĉi tie klarigojn, helpon por gramatiko, por vortlernado, ekzercado. Nun aldoniĝis nova paĝaro, do lernado eblas surbaze de du lingvoj: la germana kaj la angla. Lingvoelekto eblas en la supra dekstra angulo ĉe https://esperanto.lingolia.com
Tre ŝatataj estas ankaŭ la bildvortaraj kalendaroj, kiuj estas akireblaj en pluraj lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto. Senpage oni povas deŝuti ilin en pdf-formato ĉe
https://www.lingolia.com/de/news/view/kalender-2018

**8.3. Lernado per interreto:** http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=54861342
Ni metis plurajn ret-ofertojn al bone trovebla loko sur la AGEI-paĝaron por lernado, ekzercado. www.esperanto.de/agei, menuo: **Kursoj, lernhelpiloj**. Vi trovas kompletajn kursojn, retvortarojn, ktp.

**8.4. Novaj uzreguloj ĉe edukado.net**

La oficiala registrejo de ĉiuj kursoj en la mondo estas ĉe www.edukado.net. Nek ILEI nek UEA volas eluzi limigitajn homfortojn por fari la saman kolekton ĉe sia flanko. La retejo proponas la eblon elekti parton de la listo, vidigi kursojn laŭ niveloj, ktp. Por uzado de granda kolekto de instrumaterialo, ekzercoj validas la regulo: registru vian kurson kaj vi ricevos liberan aliron. Same, se vi liveras ekzercon, kiun vi mem verkis.

**Novaĵo: ekde 01.01.2018 ILEI-membroj havos liberan aliron al ĉiu instrumaterialo!** AGEI-membroj, kiuj deziras uzi tiun servon, devas anonci tion al mi (zsofia.korody@esperanto.de) kun jenaj indikoj:

Familia nomo, Individua nomo, Elektita uzantonomo por edukado.net, Urbo, Lando

## 9. Por instruistoj: laboro, trejnado, instrukapabligado

**9.1. Laboreblo en la Profesia kaj Teknika Kolegio Pingliang, Ĉinio**

La Kolegio kun 500 laborantoj kaj 6000 studentoj, intencas inviti du-kvar fremdlandajn volontulojn por instrui la anglan lingvon kaj samtempe funkciigi Esperanto-lecionon kiel nedevigan programeron por interesitaj studentoj kaj instruistoj. La kandidatoj devas bone regi Esperanton kaj la anglan lingvon. La kolegio liveros al ĉiu volontulo senpagan loĝadon kaj monate 2000 RMB da honorario, kiu sufiĉas por pagi bonan manĝadon de minimume du homoj en la manĝejo de la Kolegio. La volontuloj povos volontuli semajnon ĝis 12 monatojn laŭ siaj plaĉoj. Al tiuj kiuj laboras pli ol 6 monatojn, la Kolegio repagos la koston de la dudirektaj vojaĝoj. Retejo de la Kolegio: http://www.plvtc.cn/

Lokaj esperantistoj en Esperanto-Centro Ora Ponto en Ĉinio, pretas helpi instruadon de Esperanto en la kolegio. Interesiĝantoj pri tio kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao<trezoro@qq.com> kaj s-ron Ardo<esphugp@126.com>. skajpo: huangyinbao.

**9.2. Unujara EIT kun kulmino en ilei-kongreso 2018**

ILEI kunlabore kun Katalin Kovats, redaktoro de edukado. net proponas intensan trejniĝon pri instruado de Esperanto dum la 51-a ILEI-kongreso en Madrido. La formado konsistas el du partoj: reta preparkurso pri metodiko plus partopreno en seminario kun ĉeestaj atelieroj kaj ekzamenoj. La reta teoria kurso baziĝas je mallongigita kursmaterialo de RITE (privata kurso de E-duKati, Katalin Kováts, trovebla en la Klerigejo de edukado.net http://edukado.net/klerigejo/rite), je ties 26 lecionoj pri metodiko kaj 14 leciona gramatika kurso. Je ambaŭ studobjektoj la unuoj konsistas el teoria parto, testo kaj hejmtaskoj, kiuj estas individue analizataj kaj taksataj. La lastaj lecionoj de metodiko preparas la studantojn al la dumkongrese prezentota modelleciono. La materialo estas ampleksa, necesas plurmonata diligenta studado por trakti la lecionojn kaj plenumi ĉiujn taskojn. La teorian retan kurson sekvas dum la kongreso/seminario: 4-taga ĉeesta formado, kun 6-hora programo tage dum la ILEI-kongreso. En la seminario la partoprenantoj laboras tage en proks. duhora ateliero pri instruado, traktante konkretajn metodikajn taskojn. En tiu ĉeesta programo okazas ankaŭ la prezento de la 15-minutaj modellecionoj de la kandidatoj. La modellecionojn la kandidatoj prezentos kadre de kurso, kiun gvidos Katalin Kovats, kaj kiun la trejnatoj observas. Ili intervenas laŭplane kun siaj lecioneroj. La prezentoj ĉiutage estas publike traktataj kaj taksataj en la seminario. Ĉar tage eblos nur maksimume 6 ekzamenlecionoj, la nombro de la seminarianoj povas esti maksimume nur 24. La sukcesintoj en la teoria reta parto kaj en la praktika seminario surloka ricevos diplomon de ILEI pri la instruado de Esperanto. Partoprenkondiĉoj: kono de Esperanto minimume je B2, sed prefere je C1 aŭ C2 niveloj. La aliĝintoj havos skajpan intervjuon kun Katalin Kovats.
Kosto de la formado: por la partoprantoj de la ILEI-kongreso en 2018 estos 55%-a rabato de la RITE-kursoj http://edukado.net/klerigejo/rite/kotizo
Jen la rabatitaj prezoj: Baza kotizo: 200 eŭroj, A-landoj 130 kaj B-landoj 80 eŭroj. Pri eventuala stipendio la kandidatoj informiĝu ĉe la Landa Asocio, ĉe ILEI aŭ ĉe privatuloj. Tiu kotizo inkludas la retan kurson, liberan aliron al ĉiuj instrumateraloj de edukado. net kaj ĉeestan seminarion en la kongresa semajno julie 2018 en Madrido. (La kosto ne inkludas kongresan kotizon, nek la loĝadon kaj manĝojn). Jamaj studentoj de RITE povas sen plia pago partopreni la praktikan, dumkongresan parton, sed necesas, ke ankaŭ ili anoncu sian intencon frue. La reta kurso startas la 16-an de oktobro 2017. Aliĝi eblas ĉe rite@edukado.net kun kopio almirejo.mireille@gmail.com

**9.3. Dua eblo por fariĝi diplomita Esperanto-instruisto**

RITE + 2xPOZNAN: Tiu programo funkcios laŭ la sama skemo kiel la unua.
Perreta lernado, lertigado, kadre de RITE ĉe www.edukado.net kun persona kontakto kun Katalin Kovats.
Daŭro: de 1.1.2018 ĝis 31.12.2018. Do tutjara lernado. Komenco je 1.12.2017 eblas. Ĉeesta parto: unu semajno komence de februaro en Poznan, Pollando. Unu semajno fine de septembro en Poznan, Pollando.

**10. STUDSEIOJ, INTENSAJ KURSOJ kaj**
**INSTRUKAPABLIGADO**
**de AGEI kaj GERMANA ESPERANTO-CENTRO**
**en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo**

# 2018

**1) februaro 23 – 25:** Klerigseminario + interesaj ekskursoj por gastoj kaj staĝantoj

**2) junio 28 – julio 01:** Klerigseminario kun diversaj fakaj temoj, ekskursoj en la Harz-montaro

**3) julio 02 – 08:** Internaciaj Esperanto-Kursoj (SEP – Somera Esperanto-Perfektigo)



**4) septembro 28 – oktobro 03:** TORPEDO-13 – Pedagogiaj Tagoj kun ekskursoj

**5) decembro 14 – 16**: Klerigseminario kun Kristnaska kaj Zamenhof-festo

# !!! MODULA KLERIGADO – SEN KOTIZO !!!

La instrukapabliga trejnado de instruemuloj ne estas facila afero parte pro la organizado de sufiĉaj trejnkursoj, seminarioj sub gvido de fakuloj, parte pro la multekostaj alveturoj, tranoktado kaj partoprenkotizo por trejnotoj en tiaj ĉeestaj periodoj. Pro tio grupo de fakuloj el Germanio ellaboradis trejnmaterialojn kaj ofertas interretan platformon por memlernado.

- La studmaterialoj estas je dispono por ĉiuj enskribiĝintaj uzantoj.
- La moduloj estas studeblaj en libera sinsekvo, laŭ propra elekto.
- La studmaterialojn sekvas ekzercoj, testserioj por memkontrolado.
- La studado per interreto ne postulas kotizon.

La bone strukturitaj moduloj ebligas laŭpaŝan studadon, la fakbranĉoj, unuoj kun t.n. kreditpoentoj sekvas la sistemon de universitataj studoj kaj enhavas la sekvajn temojn:

- GRAMATIKO
- HISTORIO
- KOMUNIKADO
- KULTURO
- LINGVISTIKO
- LINGVOPOLITIKO
- LITERATURO
- METODOLOGIO
- MOVADO
- ORGANIZADO
- PUBLIKAJ RILATOJ

Por testi la unuajn partojn de tiu nova studplatformo ni alvokas al partopreno. La unuajn elektitajn volontulojn por la testfazo ni informos pri la detaloj kaj invitos al la nova paĝaro.

Lokaj Esperanto-grupoj, landaj asocioj povas rekomendi tiun ĉi studeblon al siaj aktivuloj kaj aliaj interesiĝantoj. Dankon pro informado, alvokoj, persona konsilado, subtenado de kandidatoj!

Se vi interesiĝas kaj planas seriozan studadon kaj ofertas vian helpon por testado de materialoj,
**bv. sendi vian aliĝon ĝis 31.12.2017 al** zsofia.korody@esperanto.de

Dezirante al vi ĉiuj sukcesan jarfinon, agrablajn festotagojn kaj multe da ĝojo, feliĉo en la nova jaro,
kun amikaj salutoj,

Zsófia Kóródy

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto

